



NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 275

Dépôt à la Bibliothèque Nationale, au fonds normand de la Médiathèque de Caen
et à la bibliothèque de Cherbourg.

Oktober 2019

Prezidas : Veronik Girard

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48
ivnicolas@sfr.fr Enpaĝigas : Michèle Langeois

Abon-kotizo : 10 €. « Espéranto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasistino : Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre



Enkonduko de la Prezidantino,

En Equemauville, ni spertis tre agrablan kaj interesan tagon, en tiu vilaĝo kiu apudas Honfleur. Estis je nia dispono salono kaj manĝejo de la lernejo. La urbestro kaj vic-urbestro instruis nin pri la historio de la apuda preĝejo kies listo de la soldatoj malaperintaj dum la unua mondmilito malsamas de tiu sur la surstrata monumento. Legu en la paĝoj 2a, 3a kaj 4a.

En la paĝoj 8a kaj 9a, Pierre Marchand rakontas pri Marcel Bosc, kiu siatempe faris multe por Esperanto en Normandio. Liaj diverstemaj ilustraĵoj tre certe distros kaj mirigos vin. Marcel, kia talento !

Bicikle al Portugalio, Claude vizitas esperantistojn kaj neesperantistojn, ni vetu ke ĉiam li parolas pri esperanto. Legu en la paĝo 10 a. Sed ne mistrafu la aliajn paĝojn ! Ili ankaŭ bone ilustras la vivon de nia regiona asocio. Mi esperas ene de « Esperanto Normandie » kunan agadon, kaj kreskon de niaj esperantaj kapabloj. Dankegon pro via ĝoja kaj amika bonvenigo!

Veronik Girard.

ENHAVO

- P. 1 : Enhavo, enkonduko de nia Prezidantino
- P. 2 et 3 : A.G mai 2019 Équemauville
- P. 4 : Tre bela tago en Equemauville kaj Honfleur
- P. 5 : Petro Berthelot en Honfleur
- P. 6 et 7 : La turisma tago en Carentan
- P. 8 et 9 : Marcel Bosc
- P. 10 : Claude Rouget vojaĝas bicikle
- P. 11 et 12 : Élections européennes
- P. 12 : En la ĵurnalo

Notre A.G de mai a décidé de maintenir la cotisation à 10€ pour l'année 2020 (à régler à Sylvie Caron, notre trésorière). Nous avons besoin de votre adhésion pour développer de nouvelles activités. Le prix des timbres étant, lui, en forte augmentation, si vous souhaitez ne recevoir que la version numérique de notre bulletin merci de le signaler à Yves.

COMPTE-RENDU DE L'ASSEMBLÉE GÉNÉRALE d' « ESPÉRANTO-NORMANDIE » du 18 MAI 2019 à ÉQUEMAUVILLE

Les 29 participants venus des 5 départements normands ont été accueillis, dans la salle Chocolat attenante à l'école Les Rainettes, par Sylva Gondoin, notre espérantiste locale et par Véronique Coutelle. Cette dernière, maire-adjointe d'Equemauville, a introduit l'assemblée générale par un mot d'accueil très chaleureux et humaniste.

Le **rapport moral** pour l'année 2018, présenté par **Yves Nicolas**, fait état de belles réalisations pour une association forte d'environ 70 adhérents :

- une tournée régionale des chanteurs « La Kompanoj » qui a certainement contribué à la création d'un cours à Avranches animé par Christian Levesque dans le cadre de l'Université InterAges de Normandie
- une assemblée générale originale et dynamique à L'Aigle
- la parution régulière, trois numéros par an, du bulletin normand mis en page avec talent par Michèle Langeois. Ces numéros sont déposés à la Bibliothèque Nationale et dans les fonds normands des bibliothèques de Caen et de Cherbourg sans oublier les dépôts et musées de Vienne, La Chaux-de-Fonds, Gray et aux sièges des associations nationales.
- accueil d'un conférencier croate

Sylvie Caron, dans son **rapport financier** a repris les éléments de l'exercice présentés dans le bulletin du mois d'avril tout en précisant que les dépenses les plus importantes furent liées à la location des yourtes et à l'accueil à L'Aigle, les frais de déplacement et de Sacem des « Kompanoj » sans oublier les frais habituels d'impression et d'envoi du bulletin. L'association a également souscrit pour la première fois une assurance dont la cotisation annuelle avoisine 115 €.

L'assemblée générale approuve les deux rapports et opte pour le maintien de la cotisation annuelle à 10€.

Les Projets

La visite touristique aura lieu à Carentan où nous accueillera Rémi Troisgros, le 5 octobre. Un Belge, Yves Nevelsteen, fera étape à Hérouville-Saint-Clair en novembre, dans le cadre d'une tournée nationale. D'autres tournées de conférenciers organisées par Yves Nicolas pour Espéranto France pourraient donner lieu à des étapes normandes en 2020 ;

plusieurs contacts sont en cours.

Barthélémy Maurau étudie la possibilité d'une visite touristique à l'automne 2020 à Evreux. D'autres candidatures sont bienvenues pour les années à venir.

Le bulletin mériterait une plus grande variété d'articles. Il suffit à chacun d'en devenir le correspondant local régulier ou de faire confiance à son inspiration. A vos plumes !

Avranches devraient accueillir notre Assemblée Générale de 2020

Les espérantistes du groupe récemment constitué à Avranches devraient accueillir notre prochaine AG. Le projet repose sur nos amis du Sud Manche, très en pointe en ce moment ! Cette AG prometteuse devrait avoir lieu en mai. Chouette ! Du nouveau dans le Conseil d'Administration !

Patrice Dufeu (76) et Elisabeth Mérel (50, en remplacement de Françoise Glémot), entrent dans le Conseil d'Administration. Ils y rejoignent : Christian Levesque (50), Anne-Marie Leprévost (61), Pascal Hébert (61), Barthélémy Maurau (27), Yves Nicolas (14), Jean-Pierre Sauvage (14), Véronique Girard (14), Sylvie Caron (76) et Matthieu Lecesne (76).



Au 1er rang, Véronique, Anne-Marie, Sylvie et Barthélémy, au second rang, Patrice, Jean-Pierre, Elisabeth et Yves.

Il manque Christian, Pascal et Matthieu.

Une présidente. Enfin !

Pour la première fois de son histoire, notre association régionale sera présidée par une femme **Véronique Girard**, entourée d'une femme pour la trésorerie, Sylvie Caron, et d'une troisième femme, Anne-Marie Leprévost, pour le secrétariat ! Nous sommes certains que nos amies apporteront du nouveau et du beau pour le développement de l'espéranto dans notre région.

D'après le compte-rendu de **Anne-Marie Leprévost (61)**

INTERVJUO DE LA PREZIDANTINO FAR LA PREZIDINTO

Kara Veronik, kiujn rilatojn vi havas kun Normandio?

De ĉiam, mi vizitas Villers-sur-mer (Calvados) dum someraj ferioj. Tie mia avino retrovis sian fratinon, luis dometon kaj akceptis siajn genepojn. Antaŭ dudek kvin jaroj, miaj gepatroj aĉetis la domon kie mi loĝas de tri jaroj.



La Prezidantino Veronik
kaj la
Prezidinto Ivo

Kiam vi lernis E-on, en kiuj cirkonstancoj ?

Mi eklernis ĝin en 2004, kiam miaj filoj ne plu volis, ke mi zorgu pri ilia vesperaj lernotaskoj. Plurfoje mi aŭdis pri esperanto : la bona lingvo, la vortluda lingvo, la malsukcesa projekto, la internacia lingvo facile akirebla... Post la apero en "LE MONDE" de granda paĝo aĉetita de japana entreprenisto, mi informiĝis pri la kluboj en la pariza regiono kie tiam mi loĝis. Mi aĉetis la metodon "Cours Rationnel" kaj sekvis la perkorespondan kurson (kiun prizorgis Odile Masseron (14)). Mi deziris kontroli ĉu estas vere, ke sin esprimi per Esperanto estas facile. Mia (tipe normanda) respondo : « Eble jes, eble ne ! ». Mi tre rapide (post du jaroj tamen) proponis min kiel kunlaboranton ĉar lernante esperanton, mi ankaŭ malkovris la internan ideon. Tre plaĉas al mi regule praktiki utopion !

Ene de kiuj asocioj?

Mi unue aliĝis al SAT-Amikaro. Poste, kiam mi kapablis legi kaj kompreni esperanton, mi aliĝis al SAT. Tiam Petro Quillaud (76) estis la peranto por la franclingvanoj. Post mia transloĝiĝo, mi aliĝis al Hérouvillle Espéranto kaj Espéranto Normandie.

Kiun rolon vi havas sine de la SAT movado?

(SAT: Sennacieca Asocio Tutmonda <http://satesperanto.org/>)

Sine de SAT-Amikaro (SAT-Amikaro asocio konatigas SAT-on al la franclingvaj esperantistoj) mi respondecas pri la libroservo (de 2008), mi esperas baldaŭ transdoni la taskon. Dum kelkaj jaroj mi plie estis komitatano. Kelkfoje, mi enretigas informojn ĉe <http://sat-amikaro.org/>. Mi enpaĝigis kaj zorgis pri la eldono de la libreto " Dekdu kugloj breloke montitaj – Douze balles montées en breloque ", verkita de L. Guilloux tradukita de Philippe Adeline.

Sine de SAT mi respondecas pri la adresaro (depost tiu ĉi somero), kaj aliaj etaj taskoj
Sine de SAT-EFK mi partoprenas la eldonprojektojn
<http://www.satesperanto.org/eldonkooperativo/>).

Kiel vi antaŭvidas vian prezidentecon en la normanda asocio?

Mi esperas fruktodonan kunlaboron por pluivigi la etoson kaj agadojn de la Normanda Asocio. Mi ege ŝatus, ke per mia propra kontribuo venos novaj proponoj kaj sin implikiĝos multaj homoj.

Plenan sukceson al vi, Veronik !

Présentation de 2 membres du conseil d' administration (la suite au prochain numéro)

Patrice DUFEU

J'habite au Havre, j'ai 63 ans et je suis retraité. Je fais partie aussi du groupe Espérantiste local, duquel je suis secrétaire. Comment je suis venu à l'Esperanto ? En 2003, j'essayais difficilement d'apprendre le Portugais depuis un an. Quand, arrivé à Porto, je me suis aperçu que les Portugais ne comprenaient pas ce que le leur disais dans leur langue, j'ai retourné mon livre Assimil et là, j'ai vu une publicité pour une langue étrange qu'on pouvait apprendre « sans peine ». Et c'est ainsi que je suis tombé dans le chaudron ! Je corrige aussi les élèves du cours ikurso.

Christian LESVEQUE

J'habite près de Granville, dans un village au joli nom de Saint-Michel-des-Loups. Je travaillais au Comité d'Entreprise de EDF où j'étais plus particulièrement chargé des vacances des salairiés. J'ai maintenant 82ans et mon apprentissage de l'espéranto remonte à bien des années ! Je suis membre de UFE, SAT-Amikaro, SAT. Je lis « Esperanto-Info » et « La Sago » et suis en contact avec d'autres associations régionales comme Espéranto-Périgord et Espéranto-Bretagne. Mon engagement principal est l'enseignement de la langue à Granville et depuis plus d'une année à Avranches dans le cadre de l'Université Inter-Âges de Basse-Normandie. J'ai une correspondante polonaise.

TRE BELA TAGO EN EQUEMAUVILLE KAJ HONFLEUR !

Por la unua fojo, la verda flago flirtis en urbeto Equemauville kiu tre afable nin akceptis. Petro Lemarchand (76) alportis valorajn brokantaĵojn kiujn li heredis de S-roj Jouis kaj Véron kaj de Petro Quillaud nun 93 jaraĝa. Li bezonis tri tablojn por ilin senpage meti je la dispono de la ĉeestantoj. Granda sukceso : nenio restis je la tagofino.

Post vizito de la apuda preĝejo kun klarigoj de la urbestro, Michel Bailleul, kaj de Véronique Coutelle (ni kaptis la okazon por donaci ĉekon por la kulturaj aferoj de l'urbo), ni tagmanĝis en la eksa lernmanĝejo kun buntaj kaj bongustaj pladoj de ĉiuj preparitaj.

Konkludante sian francian turneon en Normandio, Georgo Handzlik distris nin per multaj kantoj, humurplenaj, ritme dolĉaj kaj prononce perfektaj. Tiu fama pola esperantisto kaj lia edzino, ĉarmis nin pro sia afableco kaj scivolemo.

Ili surmetis edziĝfestan kostumon (jes ja, nova paro ili estas) por nin akompani laŭ stratoj de la tre fama haveno Honfleur.

Jacqueline Reich fariĝis nia ĉiĉerono laŭ la ĉefaj stratoj kiujn ĉiutage laŭiris ŝia avo, Auguste Hullin, kiu promociis Esperanton en Honfleur dum multaj jaroj (legu nian aprilan numeron).

Ni faris foton sur la urbodoma ŝtuparo kie fotiĝis la normandaj kongresanoj en majo 1949, precize antaŭ 70 jaroj. Ni aktivu plu, senĉese, esperplene, serene, bonhumore, por ke post 70 pliaj jaroj okazu nova foto sur la samaj ŝtupoj, t. e. en 2019 !

Sed, ni jam donas al vi novan kaj pli rapide atingeblan rendevuon : Vivu nia Ĝenerala Asembleo en majo 2020, en Avranches !



Jacqueline Reich, nia ĉiĉeronino



Antaŭ la urbodomo en 1949 kaj en 2019



Dum la vizito de la tutligna preĝejo Sankta Katerina, Véronique Bessin staris sub la pentraĵo pri la mortigo de sia pra onklo, **Petro Berthelot**, por rakonti lian eksterordinaran vivon al aŭskultantaro tre atentema.



Kial paroli pri tiu persono ?

Ĉar mi apartenas al lia familio : Petro Berthelot estas mia pra, pra,,,pra (dekdufoje) onklo ; dekdu generacioj disigas nin, miaj geavoj nomis mian patron « Petro » en memoro de tiu praulo.

Petro Berthelot naskiĝas en Honfleur en 1600. Li estas la unua filo de Pierre Berthelot kaj Fleurie Morin, antaŭ naŭ fratoj kaj fratinoj ,

Kiam li estas dekdu jara, li enŝipiĝas sur ŝipo de sia patro, la « Aglo ». Scivolema li rapide lernas la profesion de maristo. Je 19 jaraĝo, li iĝas piloto.

Dum tiu epoko, multaj francaj ŝipoj vojaĝas tra la mondo. Honfleur nodas rilatojn kun Brazilio, Guineo, Antilioj, Kanadio, Hindio, k.a. En 1619, komercistoj formas ekspedicion de 3 ŝipoj ĝis orienta Hindio, lando de spicoj. Ili dungas Petro-n sur la ŝipo ..« la Espero » !

Post plurmonata vojaĝo en aĉaj kondiĉoj, la ŝipo alvenas apud Java ; mankas akvo kaj manĝaĵo surŝipe. Nederlandaj piratoj atakas kaj elrabas la ŝipon « la Espero ». Restas nur 10 personoj el la 117 vojaĝantoj ! Petro estas inter ili, la 10 maristoj interkonsentas kun la nederlandaj instancoj plenigi la ŝipon per spicoj kaj reveni ĝis Honfleur sed la « Espero » estas bruligita kun sia precioza kargo. La postvivantoj revenas al Francio escepte Petro kiu decidas resti en Hindio.

Li laboras kiel piloto por francanoj, nederlandanoj kaj finfine amikiĝas kun portugaloj. Komence de la 17a jarcento, portugala kolonia imperio estas la unua en la mondo ! En 1625, Petro ekservas la portugalan gubernion en Goa kie li estras ŝiparon el 30 ŝipoj. Li sukcesas purigi la markolon de Malaca (aktuale Singapuro) de multaj piratoj. Li estas agnoskita kiel bona piloto, ŝipestro kaj ankaŭ bona desegnisto de mapoj ; li parolas flue la malajan lingvon.

Kvankam li ricevas grandan honoron de la portugala vicreĝo, Petro sentas alvokon pro eniri en religion, kaj decidas iĝi karmelano en 1635 ; li ricevas la nomon « frato Denys de la

naskiĝo ».

La vicreĝo koleras pri tiu decido ; li perdis tiel bonan soldaton ! Li demandas al la monaĥestro permeson por ke Petro eliru kiam la gubernio bezonos piloton.

Dufoje Petro estas alvokata :

1-okaze de la sieĝo de Goa de la nederlandanoj, la monaĥo Denys (Petro) estras militan ŝiparon kontraŭ okupantoj ,

2-en 1638, la portugala gubernio volas konkeri Achem, kaj pro tio sendis Petron kaj grupon da soldatoj. Ĉar la loka reĝo postulas de Petro kaj de la aliuloj malkonfesi sian kristanan kredon por iĝi muzulmanoj, ili firme rifuzas kaj estas malliberigitaj. Post unu monato de turmentoj kaj suferado, la reĝo decidas mortigi ilin. Ĉiuj mortas escepte Petro, kiun ne atingas la sagoj : la soldatoj rifuzas mortigi tiun religiulon. La reĝo volas venigi elefantojn por dispremi lin, sed finfine fortega viro sukcesas tranĉi la kapon de Petro per glavego (vidu la bildon)

Post tiu morto okazas **strangaj eventoj** :

La korpo de Petro ne putras, ĝi restas sendifekta. Ĉirkaŭ la korpo aperas lumetoj, muzikoj, parfumoj...

Ĝi estas enterigita, sed baldaŭ revenas ĝis la loko de la mortigo. Due, la korpo estas ĵetata en maron kun peza ŝtono, sed denove revenas. Fine ĝi estas portata meze de granda arbaro por esti manĝata de la sovagaj bestoj ; sed por la tria fojo, la korpo revenas samloken.

Ĉu legendo, Ĉu vero ? Mi ne scias... Post multaj gracoj, mirindaj faktoj, eĉ mirakloj dank'al Petro Berthelot, la katolika eklezio, surbaze de atestoj kaj dokumentoj, beatigas Petron Berthelot en 1900.

Véronique BESSIN (50)



Intervjuo de Rémi Troigros, nia ĉiĉerono en Carentan

Rémi, vi organizis tre belan viziton de Carentan kaj de la apuda naturo. La partopreantoj ĝuis tiujn momentojn en rimarkinda naturo kiun vi talente priskribis. Ĉu la preparo de tiun turisma tago postulis multe da laboro kaj kiuj aferoj estis nepre preparendaj ?

Komence de la preparo, mi ne bezonis multe da tempo. Mi nur vizitis piede la lokojn kiuj ŝajnis al mi vizitindaj. Kelkaj pertelefonaj diskutojn mi bezonis por prepari la unuan version de la programo. Ve, kelkajn semajnojn antaŭ la turisma tago, duono de la programo fiaskis, ĉar vojaĵ laboroj estis malhelpontaj la akceson al la birda observejo kaj al la boato trans la marŝo. Haste, mi devis ŝangi la planojn kaj do, mi elektis la "pointe de Brévand". Tiu natureca vidindaĵo estas pli interesa dum malaltaj tajdoj, do ni estu vizitontaj ĝin matene, kaj vizitontaj la urbon posttagmeze.

Finfine, ĉio glatis. Feliĉaj homoj estas belega rekompenco por iom da zorgoj !



2) Kiel por vi mem estis fruktodona tiu renkontiĝo ?

Samkiel mi ĵus diris, mi estis feliĉa ke samideanoj ĝuis belajn pejzaĝojn kaj bonan etoson. Mi ankaŭ estis feliĉa renkonti homojn kiujn mi nur konis per papero, aŭ tra elektronika mesaĝilo. Tutcerte, mi provos konservi kontaktojn kun tiuj lokaj grupoj, esperante partopreni pliajn agojn.

3) Ĉu via profesio estas en rilato kun naturo ?

Mia profesio estas arbarista teĥnikisto. Mi zorgas pri arbaroj kaj naturaj medioj (konservejoj) en Manche kaj Calvados.

Ĉar mi estas natur-amanto, unu el miaj ŝatokupoj estas fungologio (studo de fungoj). Ankaŭ profesie mi povas praktiki tiun ŝatokupon, ĉar mi partoprenas en la nacia reto de arbaristaj fungistoj.

4) Kiam vi lernis E-on (kaj en kiuj cirkonstancoj) ?

Fakte, mi eklernis la bazojn kiam mi estis 17 jara(antaŭ kelkaj jaroj) kun Renée Triolle kiu laboris en mia liceo, dum tagmezaj paŭzoj.

La tiama materialo estis "El popola Ĉinio" gazeto.

Pasis kelkaj jaroj dum kiuj naskiĝis kvar infanoj, kaj kreskis la hejma laboro !

Mi rekomencis lerni ĉirkaŭ en 1994, unue dank al "Assimil" libro kiun mi aĉetis, poste dank al la paĝaro "Lernu".

Tiu paĝaro estis tiel efika ke mi decidis helpi aliajn komencantojn kiel "lingvo helpanto".

Nun "Lernu" ne plu bezonas lingvo-helpantojn, do mi daŭrigas mian agadon ĉe lkurso (paĝaro de Esperanto-France)

5) Kiel vi uzas ĝin nun ?

Estas multaj okazoj praktiki la lingvon. La plej impresa estas partopreni UKojn. Malfeliĉe, ne ĉiam estas facile (ofte multekostas) vojaĝi tra la mondo.

Bonŝance mi partoprenis en du UKojn.

Ĉiutage, (fakte kiam mi havas sufiĉe da tempo) mi povas legi artikolojn de mia plej ŝatata revuo, "Monato" eldonita en Belgio. De tempo al tempo mi legas artikolojn de "Esperanto" la revuo de UEA, kaj de "La Ondo", rusa beletra revuo.

Mi ankaŭ abonis podkastojn de "Varsovia Vento", "Pola Retradio" "Ĉinio internacia", "Radio Vatikano"

Ne ĉiuj elsendoj estas interesaj, sed ili estas bona okazo aŭdi bonstilan esperanton.

Por fini, laŭ mia opinio, la plej bona kaj agrabla okazo praktiki la lingvon, estas kiel en Carentan, babiladi kun samideanoj !

6) Ĉu vi iel povos helpi lokan grupon, aŭ la regionan asocion, kiam vi estos emerito ?

Ah, tiu emeritiĝo pliproksimiĝas tage post tage ! Certe, mi uzos parte de mia nova libera tempo por partopreni pli bone kaj pli ofte en la movado.

Do ni renkontiĝos denove !



30 samideanoj de la 5 normandaj departementoj kunvenis en Carentan, je 60 kilometroj de Caen en Manche (Departemento La Maniko)
Tiu urbo famas pro siaj marĉoj.

Matene, ni promenadis en Pointe (kabo) de Brevand, kie per binokloj ni admiris multe da birdoj, sed bedaŭrinde fokoj ne montriĝis.
Post bonega komuna tagmanĝo en restoracio, ni vizitis ĉarman urbeton Carentan.

Remi surloke klare gvidis nin.

Claude FERRAND (14)



Yolande kaj 7 membroj de la estraro Veronik, Anne-Marie, Christian, Sylvie.

Malantaŭe, Elisabeth, Ivo, Patrice.

Samedi 5 octobre, les Esperantistes normands se réunissaient cette fois à Carentan selon une coutume maintenant bien établie. Il s'agissait de découvrir, non seulement la ville, mais aussi son estuaire et ses marais. Rendez-vous était donné en début de matinée à Carentan, vers laquelle convergèrent 30 espérantistes de plusieurs villes de la région. Ce fut un plaisir de retrouver des visages connus et fidèles de notre groupe.

Pour commencer, nous nous dirigeâmes vers la baie des Veys et les marais. Visite un peu humide mais c'est aussi cela la Normandie. Mais quelle sensation de paix et de silence ! Une immense étendue de sable – du moins à marée basse – et au loin, les îles de Saint-Marcouf dont une est une réserve

ornithologique. Pas de phoques ce jour-là mais une quantité d'oiseaux, notamment des oies bernaches dodues et bavardes, pour lesquels on nous donna un lexique en espéranto.

Une promenade de plein air le long du rivage ayant ouvert l'appétit de tous, c'est avec plaisir que nous nous sommes retrouvés à table, permettant d'échanger des nouvelles de nos différents clubs Espérantistes.

Puis l'après-midi fut consacré à la visite de la ville de Carentan : le vieux quartier, l'église Notre-Dame, le drakkar, les quais puis une dernière visite au tunnel sous le canal.

Une belle et amicale journée, organisée par Remi Troisgros qui nous a guidés avec gentillesse et attention.

Patrice DUFEU (76)



Miŝa et Anne-Marie admirent.
La route passe sous le canal !

Dank'al Rémi Troisgros kiu invitis nin, ni pasigis belegan tagon en la regiono de Carentan.

Matene, ni vizitis la marĉojn kie ni admiris multe da birdoj per niaj binokloj. Ni vidis grandan flugon da sovaĝaj anseroj en la nuba ĉielo dum aliaj bleketis inter si sur la vasta plaĝo kiun aperigis la malaltan tajdon.

Post tagmanĝo en gaja etoso, Rémi montris al ni sian urbon kun ĝia granda preĝejo Notre-Dame, la subarkaj trotuaroj, la plezurhaveno, la mirinda kanal-ponto kaj la kluzo.

Mi vere ŝatis tiun fruktodonan renkontiĝon.

Yolande Paris (27)

Marcel BOSC 1906 – 1976

Dans le dernier n° de Normanda E° Bulteno, nous évoquions la vie d'un de nos présidents charismatiques : Edgard Jouis. Cette fois-ci, une autre figure phare de notre association : **Marcel Bosc**.

Né en 1906, Marcel Bosc est le fils d'un commerçant d'articles de cuir. Il le remplace au 98 rue Casimir Delavigne à 300 m. de la gare du Havre dans son commerce, puis devient visiteur médical, chargé de promouvoir de nouveaux produits de laboratoires pharmaceutiques. A la fin 1954, il emménage rue du Cours à Sotteville-les-Rouen.

Il voyage professionnellement en Allemagne et dans toute la France, ce qui lui permet de soutenir par des conférences publiques, divers groupes d'espérantistes, aussi bien en Haute qu'en Basse Normandie. En 1970, il réside rue Malatiré à Rouen et quelques mois avant sa disparition, à Bihorel-les-Rouen.

Il apprend l'E° pendant les vacances de Pâques en 1926 avec Emile Gasse, pionnier dès 1900, de la langue internationale au Havre. Il en restructure le groupe. Il est son secrétaire adjoint dès 1928, son secrétaire en 1930, son vice-président en 1935, puis son président. En 1931, il lance un petit périodique: « Esperanta-Ligilo » sur le Havre.



En mai 1931, il devient le secrétaire de la Fédération E° de Normandie, Mr Robin (Sotteville) est le président, Mr Jouis son trésorier.

Il organise des réunions d'informations pour le grand public au Havre, Fécamp, Yvetot, Lillebonne, Rouen, Caen ... et donnera des cours d'E° au Havre, Fécamp, Yvetot. Il sera le moteur de l'organisation de congrès normands au Havre, Fécamp ...

En 1936, il organise avec le bureau de l'association Havraise la venue de Lydia Zamenhof, coordonne l'organisation des 3 cours qu'elle dispense (selon la méthode directe Cseh) avec 267 élèves sur l'agglomération havraise.



A la création de l'Union Normande d'E° (UNE) en 1947, il est nommé vice-président. En 1949 il devient son président jusqu'au congrès de Caen en 1957, où Mr Duthilleul (Caen) est élu président. C'est alors que, sous les applaudissements des congressistes, il reçoit le titre de Président d'Honneur de l'association. En 1954 l'ancien ministre de l'Education Nationale André Marie le décore et le nomme Officier d'Académie pour son action pour la diffusion de l'E°, le rayonnement de la Normandie à l'étranger grâce à son action dans les échanges touristiques et commerciaux : création au Havre (1950), puis à Rouen de son « E° Komerca Servo » avec l'Australie, la Grande Bretagne, l'Italie, l'Allemagne, les Pays Bas, Hong Kong, Bulgarie, Pologne, Japon, URSS, Nouvelle Zélande, Afrique du Sud, Suisse, U.S.A, Suède, Tchécoslovaquie, Espagne, divers pays d'Amérique du sud. (Article dans le n° 65 de Normanda E° Bulteno, d'octobre 1962).

Cette distinction (Palmes Académiques) sera confirmée en 1958 par l'attribution de l'Ordre du Mérite Touristique.



En 1956, le groupe du Havre fête Marcel Bosc pour son 30ème anniversaire d'actions incessantes pour l'E° dans le groupe et dans l'agglomération Havraise.

Fréquemment il rédige des articles pour Normanda E° Bulteno et parfois, il en est son rédacteur (1961)

Dessinateur et caricaturiste très habile, il réalisa pour sa correspondance et pour le bulletin de l'association des tampons qu'il apposait sur enveloppes et imprimés :

« LE HAVRE REVIVAS VIZITU ĜIN » (le Havre revit, visitez-le) et un autocollant amusant en espéranto pour faire connaître son adresse professionnelle d'articles de cuir.

Il édita des cartes postales et des autocollants de propagande et, plusieurs fois, réussit à avoir le tampon de la poste, à l'occasion de manifestations d'Espéranto comme pour les congrès du Havre, de Fécamp ...



Dans le n° 512 d'octobre 1999 de Franca Esperantisto (U.F.E.) pages 90 à 95, Jean Amouroux liste toutes les cartes postales, timbres édités à ses propres frais. La liste est longue de 1946 à 1964 !



Il participe, pour la dernière fois à un congrès normand le 11 mai 1975 à Val de Saône (76). Une interview, suite à cette réunion paraît dans Normanda E° Bulteno n°118 de septembre 1975. Son décès est annoncé brièvement dans le n° 122 de septembre 1976. Un article d'Edgard Jouis paraîtra en pages 2 et 3 du n° 125 de juin 1977, relatant son action continue pour nos associations, la langue internationale, la promotion du tourisme et les échanges commerciaux de la Normandie avec l'étranger.



En 1963, dans « Concorde » périodique bimestriel édité par Hubert Férez (Strasbourg) de mars-avril 1963 en pages 1 et 4, paraît sous le titre : « Un animateur du tourisme français » un article élogieux concernant son activité incessante pour la promotion de l'E° et de sa Normandie natale. C'est encore Jean Amouroux qui publie dans le n° 116 novembre 2015 d'« Espéranto Info » en page 10 un « portrait de Marcel Bosc », avec quelles représentations de ses œuvres graphiques.



Pierre Lemarchand (76)

PEDALANTE DE NORVEGIO ĜIS PORTUGALIO, CLAUDE HALTIS EN NORMANDIO.

Claude Rouget estas norvega civitano, france devena. Li nun biciklas de Norvegio al Portugalio kaj en septembro vizitis la esperantistojn en Hérouville kaj en Avranches post cent kilometraj etapoj (malgraŭ pezaj bagaĵoj !).

Claude havas intiman rilaton kun Normandio kie li restadis dum pluraj jaroj antaŭ ol definitive translokiĝi al la apudpolusa urbo, Tromsø. Li revenis en 2014, por verki tre interesan dosieron, pri la rusaj laboristoj de la granda siderurgia uzino SMN, en Mondeville (Société Métallurgique de Normandie, 14), kadre de studado ĉe norvega universitato.

Esperantistoj de Calvados kaj Orne*, biciklistoj, amikoj de Norvegio, entute 30 homoj, ĉeestis tre sukcesan kunvenon en Hérouville. Claude verve raportis pri sia bicikla aventuro kaj la utilo de Esperanto por trovi gastigantojn kaj teksi survoje novajn amikajn rilatojn. Li ilustris sian prezenton per esperantlingva diaporamo sed intervenis nur franclingve ĉar granda parto el la publiko ne scipovis nian lingvon.

Claude ankaŭ kaptis la atenton de la publiko pri sia familia vivo. Lia edzino, Ljuba, estas ruslingva kaj ilia filino, Aleksandra, denaske scipovas la francan, la rusan kaj la esperantan lingvojn. Ŝi ankaŭ sin esprimas en la norvega, la angla kaj la hispana !

La publiko metis multajn demandojn, ankaŭ pri Norvegio kaj ĝia rilato kun Eŭropa Komunumo. La tempo rapide forflugis kaj kun bedaŭro ni devis ĉesigi la interŝanĝon.

La morgaŭon, li bicikladis ĝis Avranches kie lin atendis lokaj esperantistoj por amika babilado kaj komuna vespermanĝo.

Dolĉa vento puŝu vin ĝis via vojaĝcelo, Portulagio, Claude !

***Zef Jégard**, tre fama en Esperantujo pro sia biciklado ĝis Vladivosko, donacis al Claude sian legindan libron "Papy fait le tour du monde"

Yves Nicolas (14)



ZEF kaj CLAUDE



En majo 2019, ni krozis sur "l' express côtier "

" Le Midnatsol " en Norvegio, Bergen-Kirkenes- Bergen.

Ni haltis en Tromsø. Sur la kajo, atendis nin Ljuba, nia esperantistina amikino. Ŝi ĉiĉeronis tra la urbo per buso kaj per telfero (kie mia edzo fotis nin). Ni vizitis ankaŭ la belan arktan katedralon. Finfine ni retrovas Claude kiu laboris posttagmeze. Li alvenis bicikle kompreneble !

Bela renkonto, agraba kaj amika etoso dank' al esperanto.

Michèle Langeois (14)

Ljuba dekstre sur la foto

PRI LA EŬROPAJ BALOTADOJ

Jam de longe, pluraj esperantistoj proponas liston dum la Eŭropaj Balotadoj por reklami Esperanton. En Normandio, dum la kampanjo 2019, estis gluitaj afiŝoj en kaj apud Caen (ĉu aliloke ?), kaj kelkuloj partoprenis publikan kunvenon en Cabourg. Siaflanke, Pascal Hébert aperis kiel la 29a kandidato en la oficiala nomaro de *Espéranto Démocratie Europe (EDE*)*.

Ni legu ĉi-sube analizon de Henri Rousseau (14) pri la atingoj kaj raporto de Pascal Hébert (61) pri sia sperto.

*Ricevebla informpaĝo : groups.google.fr/group/edefrance-discussions

REZULTOJ DE ESPERANTO EN FRANCIO, EN LA EŬROPA BALOTADO DE LA 26-a DE MAJO 2019

Denove tiujare, la partio "Europe-Démocratie-Espéranto" (EDE), partoprenis je la balotado por elekto de la deputitoj de la Eŭropa Parlamento. La reklampanelo rezervita je ĝia reklamado havis la numeron 26.

Suma nombro de voĉoj por EDE, kaj procento de esprimitaj voĉoj : 18 567 0,08 %

Antaŭaj rezultoj : (Vidu NEB n° 258)	Junio 2004	25 279	0,15
(Vidu NEB n° 238)	Junio 2009	29 263	0,17
- d° -	Majo 2014	33 096	0,17

Normandie	978	0,08
Cherbourg	59	0,23
Caen	20	0,07
Saint Lô	7	0,11
Alençon	4	0,06
Le Havre	34	0,08
Rouen	6	0,02

Oni povas esperi ke la konstatita malkresko de niaj rezultoj, malgraŭ grava kresko de la ĝenerala partopreno, havas la jenan eksplikon : nia kutima voĉdonantaro okaze de tiu baloto, ne estas la esperantistoj mem, kiuj plejofte havas aliajn politikajn prioritatojn, superajn je esperanto, sed personoj kiuj aŭ ne plu fidis je politikaj partioj, aŭ ne interesiĝas pri politiko, kaj kiuj sindetenus se EDE ne ekzistus. Tiujoge, povas esti ke la kvazaŭ dramatikigo de la situacio instigis sufiĉe grandan nombron da sindetenantoj aŭ da voĉdonantoj por EDE, decidis voĉdoni por la grandaj partioj.

Ni ankaŭ povas substreki ke la reklampanelo n° 26, rezervita al ni esperantistoj, restis preskaŭ ĉiam virga, senafiŝa, silenta, kredigante je nia malekzisto. Eble EDE mem ne sufiĉe insistis apud la lokaj grupoj pri tre konkretaj faktoj kiuj povas ŝajni evidentaj kaj sensignifaj por militantoj kutimigitaj pri socia agado, sed kiuj estas tute fremdaj al personoj kiuj neniam gluis politikajn afiŝojn. Jen pri kio mi pensas :

ESPERANTO

langue commune équitable pour l'Europe



Notre projet :

- Adoption de l'espéranto, langue commune équitable de l'Europe, en complément des autres langues européennes.
- Utilisation de l'espéranto comme langue de travail dans les agences et institutions européennes, lorsque le recours à la traduction et à l'interprétation n'est pas possible.
- Enseignement de l'espéranto dans les écoles européennes.
- Création de filières d'études supérieures européennes utilisant l'espéranto comme langue d'enseignement.
- Création d'une chaîne de télévision européenne en espéranto avec des programmes éducatifs, culturels et informatifs.
- Adoption de l'hymne européen en espéranto (paroles de Umberto Broccatelli).

Notre credo :

- Redonner la parole aux Européens et relancer l'Europe... grâce à l'espéranto.

Pour s'exprimer librement entre Européens, choisissons une langue commune équitable, rapide et facile à apprendre.

Cours gratuits d'espéranto : lernu.net

Elections européennes du 26 mai 2019

Liste présentée par

- 1) Senafiŝa panelo estas pruvo de febleco kaj sensignifo, okule de la publiko kaj de la aŭtoritatoj kiuj instalas ilin,
- 2) Oni ne sufiĉe diskonigis en niaj rondoj ke ĉiu rajtas uzi panelon konforme je la celo de la partio al kiu ĝi estas atribuita. Tiel, kiu ajn esperantisto rajtis okaze glui sur la panelon 26an de sia komunumo, kiun ajn flugfolion favoran al esperanto, ekzemple trovitan en interreto. Ne estis necese mendi kaj ricevi de EDE antaŭdeterminitan nombron da ĝiaj oficialaj afiŝoj, ago kiu morale devigus ilin ĉiujn uzi.
- 3) Ne necesas aĉeti gluon specialan por tapetpapiroj por glui balotan afiŝon. Faruna gluo, hejme farita perfekte taŭgas ! Boligu unu minuton kelkajn kulerplenojn da tritikfaruno en iom da akvo, kaj obtenita ! Sperto vin instruos pri la proporcioj. Uzu larĝan penikon, almenaŭ ok-centimetran.

Henri Rousseau (14)

Mon expérience de candidat aux Elections Européennes 2019

Tout a commencé le 12 janvier au siège d'Espéranto-France lorsqu'une dame m'a demandé si je serais d'accord pour être candidat aux Européennes sur la liste Espéranto. J'ai accepté sans hésitation et elle m'a fait signer un papier disant que je consentais à être candidat. J'étais content qu'on me l'ait proposé. J'ai dû passer à la mairie pour retirer une "attestation d'inscription sur les listes électorales" nécessaire pour être candidat.

J'ai organisé une réunion à l'Aigle avec toutes les difficultés afférentes: choix de la date, réservation de la salle, diffusion de l'information (dans le Réveil Normand, 100 tracts distribués sur le marché avec ma mère, invitation de connaissances) et finalement, le jour venu, il n'y avait qu'une personne en plus de moi et mes parents pour écouter Pierre et Marcelle. Un peintre local qui sera peut-être volontaire pour réaliser l'affiche de 2024. Personnellement, j'ai appris beaucoup de choses pendant cette conférence. Ensuite est

venu le temps du collage d'affiche : Je me suis renseigné sur les emplacements des panneaux, j'ai acheté le matériel nécessaire et j'ai traversé la ville à pied avec mon seau et mes affiches sous le regard des habitants. L'espéranto était la première liste à avoir son affiche collée à l'Aigle. Mon père m'a conduit en voiture dans les villages voisins pour que j'y mette une affiche et il m'a même demandé quelques affiches pour en coller lui-même dans quelques villes, dont celle où il travaille.

Ensuite, je suis retourné sur le marché distribuer quelques circulaires et là j'ai eu une surprise car un vieux monsieur m'a adressé la parole en espéranto: "Birdo flugas". Il voulait vérifier si je comprenais l'espéranto.

Le jour de l'élection venu, j'avais encore du travail, je suis passé dans les bureaux de vote vérifier la présence de bulletins puis, le soir, je me suis porté volontaire pour dépouiller.

Le résultat final fut très décevant : seulement quatre voix à l'Aigle sachant que l'une des quatre était la mienne. Malgré tout, je n'exclus pas d'être à nouveau candidat en 2024.

Pascal HÉBERT (61)

le LE PAYS D'AUGE VENDREDI 24 MAI 2019 actu.fr/le-pays-d-auge 22

■EQUEMAUVILLE

À la découverte de l'espéranto, la langue universelle

Chaque année, l'association Normandie Esperanto tient son Assemblée Générale dans une ville de la région. Après Fiers et l'Aigle, c'est au tour d'Equemauville de recevoir cette association pas comme les autres. Car les 70 adhérents qui la composent, parlent une langue peu commune : l'espéranto.

Cette langue, créée en 1887 par un jeune ophtalmologiste polonais, le docteur Ludwik Zamenhof, se veut universelle, faite pour faciliter la compréhension entre tous ceux qui n'ont pas la même langue maternelle. L'idée forte est de détruire les murs entre les populations et de rapprocher les êtres humains. N'étant la langue officielle d'aucun État, se voulant sans aucune orientation politique ni religieuse, l'espéranto permet d'établir un pont neutre entre les cultures.

Aujourd'hui, on estime à environ deux millions les personnes qui l'ont apprise, dans environ 150 pays du monde, et à plusieurs centaines de milliers le nombre de personnes qui l'utilisent couramment dans les échanges internationaux. Le docteur Zamenhof avait constaté qu'il y avait de nombreuses racines communes dans les langues européennes, ce qui fait que les racines de l'espéranto sont à 75 % latines, puis germaniques et grecques. En somme, un véritable jeu de construction, une langue que l'on considère comme agglutinante.

Un réseau de contacts dans le monde entier

Les membres de l'association Normandie Esperanto, venus des quatre coins de la région.

C'est également grâce à son tissu associatif que l'espéranto continue à se développer. Des assemblées générales comme celle de ce samedi permettent aux adhérents de se retrouver, d'échanger, de se tenir au courant des dernières publications en espéranto et d'accueillir des invités. Yves Nicolas, président de Normandie Esperanto, fait régulièrement venir des conférenciers étrangers. L'invité d'honneur aujourd'hui était le chanteur polonais espérantophone, Georgo Handzik.

A l'issue de la réunion, on pouvait découvrir livres et documents. Car de nombreux ouvrages sont écrits en espéranto, soit directement soit par traduction. Un journal *Normanda Esperanto Bulteno* est également

publié trois fois par an.

Une visite de Honfleur a clôturé cette journée. Les participants se sont quittés en se disant « Gis Revido » ou peut-être « Bonan nokton » : tout simplement au revoir et bonne nuit !

■PRATIQUE

Normandie Esperanto, président : Yves Nicolas
Mail : herouville-esperanto@fr.fr
Tél. 06 44 87 22 48

COMMENT PARLER ESPÉRANTO ?

C'est une langue qui ne nécessite qu'un court apprentissage, fondée sur une grammaire régulière. L'espéranto évite les complications inutiles, il y a simplement 16 règles de base à observer, simples et claires, sans exception. L'écriture est phonétique, les lettres étant toujours pro-

noncées de la même façon, quelles que soient leur place et l'orthographe est régulière. Les articles définis le, la, les sont traduits par un seul mot, la. Tous les verbes et pluriels sont réguliers : il suffit d'ajouter un j à la fin d'un mot pour indiquer le pluriel.

Article paru dans " LE PAYS D' AUGE " le 24 mai 2019



**ASSEMBLÉE GÉNÉRALE
2020
Le 16 Mai à AVRANCHES**

Des nouvelles de nos ami.e.s

Marie-Thérèse kaj Petro Quillaud
translokiĝis al Montpellier.

Dezirante loĝi apud siaj familianoj, niaj amikoj definitive forlasis Grand-Quevilly. Petro, nun 93 jaraĝa, estis dum multaj jardekoj tre aktiva por reklami nian lingvon kaj ĝin instrui. Li estis unu el la plej aktivaj estraranoj de nia regiona asocio. Ni deziras al Marie-Thérèse kaj Petro tre dolĉan vivon en sia nova regiono ! (laŭ informo de Petro Lemarchand).